

# *Alvokas la prezidento Raúl Castro agi discipline en la batalo por eviti disvastigon de malsanoj*

---



La kuba prezidento Raúl Castro, alvokis la kubanojn altiĝi la disciplinon kaj konstante higienizi la urbojn, dum kunsido okazinta por analizi la agadojn celantajn eviti la disvastigon de malsanoj transmissiataj de la moskitoj el la speco Aedes.

Dum la kunsido, en la sidejo de la ministerio pri publika sano, la prezidento ankaŭ instigis agi rigore kaj ene de la leĝo, kontraŭ tiuj kiuj ne plenumas la regularojn por tiu agado.

Oni emfazis ke la epidemiologia situacio en la amerika regiono daŭre estas kompleksa kaj nuntempe ekzistas aŭtoktona transmissiado de la viruso Zika en 31 landoj, dum en Kubo oni detektis 2 kazojn importitajn el Venezuelo kaj oni daŭre kontrolas aktive ĉiujn simptomojn de nespecifa febro.

Dum la kunsido oni raportis pri la situacio en la nuna kampanjo de fumigado, pri la situacio en laborejoj, kaj ankaŭ pri la surstrataj akvo-fluoj kiuj estis solvitaj je 76,2%.

La prezidento interesiĝis pri la kolektado de rubaĵoj en la ĉefurbo kie ĉiutage kreiĝas 23 mil 800 kubaj metroj el kiuj 6 mil restas nekolektitaj pro manko de kamionoj, situacio taksita kiel kronika kaj tuj solvenda,

sen improvizado, kun disciplino en la horaro de kolektado, riparo kaj subteno de la ekipa?oj.

Raúl asertis ke ne temas pri unu plia kampanjo, kaj precizigis ke esencas kontroli ke ?io fari?u bone, kun integraleco kaj da?ro.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/86383-almokas-la-prezidento-raul-castro-agi-discipline-en-la-batalo-por-eviti-disvastigon-de-malsanoj>



**Radio Habana Cuba**